

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 45-a BRAZILIO, JANUARO, FEBRUARO, MARTO 2021 N-ro 181

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero*.

## TEKNOLOGIO SEN AMO

La tro granda zorgo de l' homo pri la fizika kaj mensa saneco ĝin sofistiki la Medicinan Sciencon, kio igas ĝin neatingebla al tiuj, kiuj ne havas monrimedojn aŭ ilin havas tre malmulte.

Danke al tia konduto, oni plilongigas la vivon de finaj pacientoj, se ili aŭ iliaj familianoj havas monon por movi specialistojn kaj maŝinojn, dum la malplifavoritoj havas sian destinton determinita de la opinio de la kuracisto, kiu havas la taskon elŝalti la aparatojn kiuj subtenas la vegetan vivon.

Sekve la rekte-ancelaj materialismo kaj utilismo – terminoj de la sama ekvacio pri la ambicia nesentemeco – superregas diversajn fakojn de la sacerdota arto kuraci.

Klare aŭ duonkaŝe eŭtanazio vastiĝas kun la konsento aŭ ne de sennombraj pacientoj, foje fariĝante antaŭdecidita hommortigo.

Rigardata kiel laŭleĝa en kelkaj landoj, kaj en aliaj malaprobataj, ĝi konvertiĝas en solvsistemo, nuntempe preskaŭ normala en multaj lokoj sur la Tero.

La teknologia progreso ne samniveleas la moralan progreson

Multaj junaj kuracistoj, antaŭ neripareblaj kripluloj aŭ malsanuloj kun limigitaj funkcioj, decidas per si mem apliki al ili la eŭtanazon, malvarme rezonante, ke se tiu malhelpo okazus al ili mem, ili ŝatus, ke tiel oni faru al ili.

Tamen, ili ne rimarkas, ke nekalkuleblaj neperfektoj fizikaj kaj mensaj penas per ĉiuj siaj fortoj daŭre vivadi, intime realigante sin, kaj ne dezirante havi sian fizikan vivon estingita.

Ĉar el la vivo ili konas nur la materian flankon, ĉi tiuj apologiistoj de la por ĝua vivo ellaciĝos.

Kiam ili havos la korpon konsumita de la morto, ili vekiĝos, alfrontante situaciojn, kiuj ilin amarigos dum nedefinita tempo, ĝis kiam la kulpa konscienco petos la benon de forgesado en estonta liberiga elaĉeto, vestontaj korpojn, kiuj suferos la devigon de indiferenteco, per kiu ili nuntempe agas rilate la aliulojn.

Sekvante la progreson de la mensoj, vi ne malzorgu la moralan progreson, ligiĝi al la amo, kiu havas la ŝlosilon kapabla solvi la enigmojn, kiujn la aroganteco de la inteligenta ankoraŭ ne sukcesis interpreti, antaŭenirante direkte al la Supera Bono, kiu estas la neelĉerpebla Fonto de ĉiuj favoroj.

**Libro:** *“Lumo de l' Espero”*

**Spirito:** *Joanna de Ángelis*

**Mediumo:** *Divaldo Pereira Franco*

**El la portugala tradukis:** *Délio Pereira de Souza*



# KARAJ REMEMOROJ PRI ŜIKO XAVIER

Benedicto Silva



La miaj kontaktoj kun Chico (proncu: Ŝiko = Franĉjo) Xavier, almenaŭ unu pravas, ke tiu medio plenumis sian mision ne nur kiel peranto inter la Spiritoj kaj homoj, sed ankaŭ kiel homo profunde interesiganta pri la enhavo de siaj mediumaj mesaĝoj.

Pri tio, mi menciis nur la dek etajn mesaĝojn sub la titolo "Esperanto kiel Revelacio", jam de longa tempo diktitajn de la Spirito Francisco Valdomiro Lorenz, pere de nia kara medio. Pri ilia apero en formo de libro, mi rakontas interesan historion.

Ĉirkaŭ la jaro 1974, iom longa tempo post la ricevo de la menciitaj mesaĝoj temantaj pri la kreado de Esperanto ankoraŭ en la Spirita Mondo, fare de la Spirito Zamenhof, Chico invitis min al rendevuo ĉe la Eldonejo de IDE (Instituto de Difusão Espírita – Instituto por Spiritismo - Disvastigo), en Araras-SP.

Tien min veturigis, per sia aŭtomobilo, la karmemora spiritisto Osvaldo Cordeiro, el Mirassol-SP...

En modesta ĉambro de IDE mi kaj kelkaj aliaj spiritistoj, inkluzive la tiama senatano Freitas Nobre kaj D-ro Hércio Marcos Cintra Arantes, tiama prezidanto de IDE, Chico Xavier komisiis al mi ne nur la verkadon, en la portugala lingvo kaj Esperanto, de la ĉapitro titolita "Esperanto: Difino kaj Nuntempa Movado", sed ankaŭ la esperantigon de la dek mesaĝoj de Lorenz kaj ankaŭ de la artikoloj de diversaj aŭtoroj, kiel, ekzemple, "Chico Xavier kaj Kulturo", de la riĉa bibliografio de F.V. Lorenz, kaj de tiuj pri la surtera kaj transtomba vivoj de Lorenz.

La unua eldono de nia dulingva verko "O Esperanto como revelação/Esperanto kiel revelacio" aperis en 1976.

Entute, IDE jam prezentis kvin eldonojn de tiu libreto idealigita kaj amata de Francisco Cândido Xavier.



# DE LA STALEJO AL NUNECO

Aymoré Vaz Pinto

Kiam Kristo naskiĝis ĉe stalejo, la mondo estis kaosa. Estis la sklaveco, la maljusteco, la krueleco. En la Templo – la fanatismo, en la Guberniestro – la tiranio. La popolo estis malscia kaj malriĉa, kaj vivis en troa laboro por subtenila lukso de la supera klaso.

Venis la Kristo kaj komencis la restarigon de la societo sur base de plibona justeco, kutimoj kaj plibonaj leĝoj.

Nun la sklaveco estas malpermesata, kvankam daŭras restajeto.

La virino ne plu estas obeema kaj rajtas civitanecon.

La kristanoj ne plu estas ĵetitaj al la sovaĝaj bestoj por prediki egaleco de la Dia Patreco inter riĉaj kaj malriĉaj, sklavoj kaj reĝoj.

En la materia kampo aperis la vapormaŝino, la eksplodmotoro, la radio, la atombombo, la ĵeto, la TV, la interreto, la aertransportilo de bombo kun granda detrupovo.

Tiuj materiaj progresoj ne kunportis feliĉon al homaro, kontraŭe alportis korporemon, timon kaj malsekurecon.

Tiu analizo permesas nin aserti ke estas danĝero la materia progreso sen la morala progreso kiu kristanismo taŭgas por favori.

En la granda vojaĝo ekserĉante feliĉon la homoj bezonas la du flugilojn = de amo kaj de saĝeco por ne riski fali en la abismon de la profundegaĵo.

## "KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 45-a – n-ro 181 | Januaro-Februaro-Marto 2021

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

## KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua rua Anibal Bruno, 22, Santa Cruz - Rio de Janeiro - RJ – Brasil (Brazilo)  
Telefono: + 55-21-98427-8080  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>  
Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br) | Fejsbuko: **Editora Lorenz**

## ○ NÉIA LÚCIA SOUZA

Néia estis prezidanto de BEL unuafoje de 1986 ĝis 1989, kies elekto okazis la 18an de julio 1986, en Curitiba, Paraná, kadre la 22a BKE.

Ŝi estis reelektita en la 28-a BKE (Anápolis-GO) la 15an de julio 1992, por la oficperiodo 1992/1995, sed ŝi eksiĝis el la prezidanteco la 7-an de julio 1993, pro privataj motivoj.

Néia naskiĝis en Cristianópolis, ŝtato Goiás, la 10an de septembro 1955. Ŝi studis Biblioteksciencon en Universitato de Brasília kaj diplomiĝis en 1981.

Néia esperantistiĝis en 1973, en Goiânia, kiam ŝi faris bazan kurson. Esperanton ŝi konas de la infanaĝo.

Néia prezidis Esperanto-Asocion de Brasília, de 1984 ĝis 1986, kaj oni povas aserti, ke tiu periodo estis la plej fruktodona, kiam la Asocio okazigis gravajn sociajn kaj kulturajn eventojn.

Ekzemple, la Asocio starigis la Gramatikan kaj Pedagogian Kursojn, en sia sidejo, de la 4a ĝis la 9a de februaro 1985, gviditajn de Geraldo Matos.

Kiam Néia estis prezidantino de Esperanto-Asocio de Brasília, la loka registaro distingis ŝin per la medalo "Mérito Alvorada", pro ŝia kontribuo al la progreso de Federacia Distrikto. La tiurilata oficiala ceremonio okazis la 6-an de novembro 1986.

Ŝi estas fakdelegito de UEA pri biblioteko.

Néia emeritiĝis kiel bibliotekistino de la Ĉambro de Deputitoj, kaj nuntempe ŝi respondecas pri la Biblioteko "Carlos Domingues", de Brazila Esperanto-Ligo, kie nia kara samideanino faras belan kaj kompetentan laboradon, kaj kien ŝi iras preskaŭ ĉiutage. Ĉiu, kiu konatiĝis kun Néia, povas rimarki, ke ŝi elradias grandan personan ĉarmon.

Kunlaboris: Eurípedes Alves Barbosa.



Néia en la jaro 1985



Néia, Neima Cardoso Adorno, Leopoldo Knoedht kaj Leda Gama, ĉe la sidejo de Esperanto-Asocio de Braziljo, en la 19a de septembro 1985.



La estraro de BEL (de maldekstre): la unua sekretario Neima Adorno, unua kasisto José Carlos Dorini Ramos, prezidantino Néia Lúcia Souza (1986).



La guberniestro de DF, José Aparecido de Oliveira, kaj Néia, en la 6-a de novembro 1986.

# KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

## POEMO



Al bogdanov, 1890  
("bulgara esperantisto", 1975,  
p. 32-33)

Tre estimata sinjoro!

Kun plezuro mi vidis el  
via letero, ke vi intencas fondi  
gazeton en nia lingvo sub la titolo

"Espero". Mi deziras al vi plej bonan

sukceson kaj mi esperas, ke via gazeto tratabos larĝan  
vojon al nia afero en via lando. Kio dependas de mi, mi  
kun plezuro ĉiam farados por via gazeto kiom mi povas  
kaj mi volonte estas preta de tempo al tempo sendi al vi  
artikoletojn por via gazeto. Sciigo pri via fondota gazeto  
estos donita en n-ro 10 de la "Esperantisto". Por ke la  
nova gazeto bone plenumu sian difinon, estus utile, ke ĉiu  
peco en ĝi estu donata samtempe en lingvoj Esperanto  
kaj bulgara.

Antaŭ ol vi komencas la eldonadon de via gazeto, mi  
devas al vi memori la jenon: la eldonado de gazeto en  
nia lingvo estas afero tre utila, kaj vi meritos per ĝi la  
dankon de ĉiuj amikoj de nia ideo; sed ĝi estas ankaŭ  
afero tre malfacila, postulas energion, fortan volon  
kaj oferemecon, ĉar nia afero ne estas ankoraŭ sufiĉe  
forta en via lando, por ke via gazeto jam en la komenco  
povu materiale sin teni. Konstantaj oferoj moralaj kaj  
materialaj de via flanko estos postulataj, por ke via  
gazeto povu sin teni kaj tratabi la vojon por nia afero. Se  
vi ne havas la decidon kaj la eblon stari forte kaj regule  
kaj pacience daŭrigi la eldonadon de la gazeto almenaŭ  
en daŭro de unu jaro malgraŭ ĉiuj perdoj kaj malfacilaĵoj,  
– tiam estos pli bone, se vi la gazeton tute ne fondos; sed  
se vi senta en vi la kapablon energie batali kaj malgraŭ la  
perdoj stari kelkan tempon forte kaj konstante, tiam pli aŭ  
malpli frue via laborado alportos dolĉan rekompencan,  
ĉar vidante poste en via lando la grandan nombron de  
niaj amikoj, kreitaj per via pacienca laborado, vidante la  
floradon de la gazeto, vi povos diri al vi, ke vi estis por via  
lando efektiva apostolo de la bona afero.

Vi devas forte peni, ke la parto Esperanta de via  
gazeto havu ĉiam tute puran kaj bonan stilon. (La  
"Mondlingvisto" forte pekis de tiu ĉi flanko). Estus tre  
bone, se vi volus ĉiun numeron sendi al mi por korektado  
antaŭ ol ĝi estos presita. Mi volonte prenos sur min tiun  
ĉi laboron.

Koran saluton al vi kaj al via klubo  
de via L. Zamenhof.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof.  
Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895.  
Eldonejo Ludovikito, 1989.)

O Esperanto, meus amigos,  
É já dos tempos antigos  
Da era de Jeová;  
Falavam-no até os bichos  
E os mandarins de rabichos  
E Noé no Arará.

Parece até fantasia,  
Que só um tolo cria  
Pois, eu digo que não é;  
Por este mundo do Cristo  
Só um cego não vê isto  
Só teimoso bate o pé.

O Bem ao Mal, que avassala,  
Em claro Esperanto fala:  
"For, for vi de tie ĉi!"  
Ao renascer eu no mundo,  
Após silêncio profundo  
Que às pedras metia dó,  
Gritaram: "Bonvenon, kara!"  
E eu respondi coisa rara  
"Koran dankon", mas foi só.

Com o Esperanto eu não creio  
De guerras haja receio  
E nem pragas de urubu,  
E lá do céu vem decreto  
- Que nada fique secreto -  
"Por ĉiuj, lingvoj nur du!"

(Emílio de Meneses – El la revuo "Reformador",  
dec. 1963, paĝo 283.)

Kunlaboris: Ismael Miranda e Silva

## SPECIALA INVITO

Se vi, karaj legantoj, ŝatas verki, jen grava  
oportuno por tion fari en niaj du revuoj: la jarlibro,  
Almanako Lorenz, kaj la trimonata bulteno  
Komunikoj. Observu ke niaj revuoj estas legataj  
en pli ol 100 landoj kaj la verkistoj estas el pluraj  
landoj, religioj, filozofioj, kulturoj ktp. Do, ne perdu  
ĉi gravan oportunon montri vian belajn kronikojn,  
poemojn al la tuta mondo! La pordoj de niaj revuoj  
estas malfermitaj por ĉiuj.

# FRATECA KAMPANJO

La Frateca Kampanjo estas kampanjo realigata ĉiujare fare de la Nacia Konferenco de la Brazilaj Episkopoj (CNBB) dum la periodo de Karesmo. Ĉiu kvin jaroj ĝi estas realigata en ekumena formo kune kun aliaj kristanaj religiaj kredoj. Ĝia celo estas vekti solidarecon de siaj fideluloj kaj de la socio rilate al iu konkreta problemo, kiu koncernas la brazilan socion, serĉante vojojn por ĝia solvo.

La temo de la Ekumena Frateca Kampanjo 2021 estas "Frateco kaj Dialogo: devontigo de amo" kaj la devizo estas "Kristo estas nia paco: el tio, kio estis dividita, Li faris unuiĝon." (Ef. 2.14a).

La nuna kampanjo reliefigas la gravecon de amema kaj inkluziveca dialogo, inspirata en la amo de Jesuo, por superi la polusiĝojn kaj perfortojn, kiuj markas la nunan mondon.

Esperanto ekde sia naskiĝo konstruas fratecan dialogon, helpante detruigi la murojn, kiuj apartigas popolojn de malsamaj lingvoj. Ĝi estas esenca komunikilo por atingi la unuiĝon en diverseco. Konsiderante la gravecon de la temo de la ĉi-jara Ekumena Frateca Kampanjo por la celoj de la esperanta komunumo, ni publikigas ĉi tie la tradukon de la preĝo de la kampanjo, kiel kontribuon al ĝia pripensado:

Preĝo de la Ekumena Frateca Kampanjo - 2021

Dio de vivo, justeco kaj amo, ni Vin laŭdegas pro la donaco de frateco kaj pro tio, ke Vi havigas al ni la korfavoron vivi la komuneco en diverseco.

Pere de tiu ĉi Ekumena Frateca Kampanjo, helpu nin atesti la belecon de dialogo kiel devontigo de amo, kreante pontojn kiuj unuigas anstataŭ

muroj kiuj apartigas kaj generas indiferecon kaj malamon.

Faru nin homoj sentemaj kaj bonvolemaj por servi al la tuta homaro, speciale al la plej malriĉaj kaj malfortigitaj, tiel ke ni povos atesti Vian savantan amon kaj kundividi iliajn dolorojn kaj angorojn, iliajn ĝojojn kaj esperojn, marŝante tra la vojetoj de amemo.

Por Jesuo Kristo, nia paco, en la Sankta Spirito, renoviga blovo de vivo, Amen!



Kunlaboris: Alvaro Motta

## POEMO

*Antonio Felix da Silva*

La ĵaluza suno  
Flugas blanka plumo  
En la blua ĉielo,  
Milda kiel la venteto  
Kiam revenas al loĝejo,  
Sed la varmega suno  
Kiel faris al flugila lvaro  
Bruligis la blanka plumo  
Nur por vidi la fumon.

## JAM ESTAS TEMPO...

Karaj gelegantoj!

Se vi ankoraŭ ne aniĝis al nia Asocio, estas tempo por tion fari. Aliĝante al ĝi vi rajtas ricevi, en la komforto de via hejmo, 2 librojn el nia katalogo, portugale aŭ esperante, Almanakon Lorenz kaj la bultenon Komunikoj (versioj PDF-a aŭ papera). Krome, vi haitas akiri aliajn librojn el nia katalogo kun rabato de 30%. Skribu al ni kaj petu vian aliĝilon: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

# TRI MOMENTOJ DE REKONTIĜO

Amiko Nelson,



Mi deziris paroli al vi, aŭdi vin, amike interparoli kun vi antaŭ via forvojaĝo, sed la oportunon ne venis, kaj la vizito, ofte prokrastita, okazis en tiu posttagmezo de la deka tago de novembro.

Sur via lito en hospitalo vi jam ne parolis, sed mi kredas, vi aŭdis min, kaj komprenis mian fratan geston karesi viajn manojn kaj kisi vian frunton. En tiu rerenkontiĝo mi bone rememoras vian serenan kaj amikan rigardon, kvazaŭ dankante mian ĉeeston, kaj komprenante mian "ĝis baldaŭ ie".

En la frumateno de la tago de via liberiĝo (la12-a), mi troviĝis ankoraŭ duondormanta, sed mi vidis min ĉeestanta vian elkarniĝon. Ne sciante kiel, mi vidis homamason, irantan sur la strato Santo Amaro, ĝi eniris tra la larĝa pordo de la hospitalo kaj iris en la ĉambro, kie vi troviĝis. Vekis mian atenton la malpezeco de la irado de tiuj entoj, kiuj ŝajnis enkarnaj, sed moviĝis kiel elkarnaj, ĉar kvankam multenombraj, ili ne interkruĉiĝis. Mi nur komprenis tion, kio okazis, kiam en la ĉambro mi vidis la verdan standardon kun la stelo de la espero, kaj mi aŭdis voĉon, dirantan: "Faru la pacon."

Tiam mi pensis: ĝi estas la standardo de esperanto, kiu certe kovros vian korpon. Ankaŭ envolvita en tiu milda emocio, mi aŭdis la telefonon, kaj mi levis min rapide. Arlette sciigis min pri via ĵusa forvojaĝo. Ĉi tiu estis la dua momento de la rerenkontiĝo.

La tria, la plej simpla el ĉiuj, okazis en la tombejo. Tie mi ĉeestis kun la celo porti amikan saluton al viaj familianoj. Mi vidis vian korpon en la ĉerko, kovrita per blankaj rozoj. Mi alproksimiĝis, por lasta rigardo kiel adiaŭo, sed mi konstatis, ke vi ne estis tie, kie restis nur via karna vesto. Mi kredas, ke vi forlasis la surteran vivon en tiu momento, kiam la amaso da esperantistoj iris renkonte al vi, kaj kunportis en novajn regionojn, kie vi daŭre laborados por la universala paco.

Ĝis revido. Suely.

N.R – Suely Alves Lopes estas fratino de Arlette, edzino de Délio, frato de Nelson. Ili lernis Esperanton en la sama epoko, kaj kune kun aliaj tri esperantistoj fondis en 1942 Asocion Esperantistan de Meier, nuna Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, kaj ili ĉiam agadis en la movado.



# RUE DE L'ESPERANTO

Foto el Saint Foy, Quebec, Kanado.  
Kunlaboris: Bianca Argentio



Se vi havas interesajn kuriozaĵojn pri Esperanto, sendu al ni.

## SENPAGAJ LIBROJ

Karaj gelegantoj de Komunikoj en la tuta mondo!  
Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron, Almanako Lorenz, tute senpage, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso. Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:  
[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

# PARIZO

El la alta sonorilturo, jen mi vidas la riveron Sena sube, kaj la urbon *ĉirkaŭe*.

La malpliiganta suno kaj la sangmakulita horizonto antaŭsentigas la noktan stelplenan vualon.

Obstine kaŝigante, la luno ludas post la nuboj, atendente la momenton de sia regado post la ekdormiĝo de la reĝa astro la suno...

Mi falas en mediton antaŭ la pitoreska pejzaĝo de la lumo-urbo, kvazaŭ vojaĝante tra mildaj konjektoj de la dorlota filozofio.

*Ĉiuj* konstruaĵoj, monumentoj, pontoj, plensignifaj lokoj, grandiozaj arkitekturaĵoj, famaj pasejoj, historiaj lokoj de tiu urbo respondas en tiu regiono pri la senĉesa homa laboro, kiu transformis nuran vilaĝon en urbon referencan pri altaj arto kaj bongusto.

Rajdaj statuoj, gigantaj *ĝardenoj*, luksega arkitekturo, Parizo, modelo de belo kaj arto.

Kiom ajn da adjektivoj ni prenos el nia intelekto, por klare prezenti tiun urban monumenton, ili ne sufiĉos eĉ por bildigi unu simplan sunradion.

Eklumante la mateniĝo, la herbo, kovrita de roso, spegulas la simplecon de la kampara *ĉiutago*, kaj, por la videmaj okuloj, *ĝi* prezentas la identiĝon de la superega arto, de la dieco kaj de la belo disŝutitaj en la imenso kaj en la grandiozo, tiel same kiel en la plej malgranda kaj en la banala.

Kiel jam dirite, la arto troviĝas en la okuloj kaj en la oreloj de tiu, kiu vidas kaj aŭdas. Al multaj,

la verdaĵoj de bosko estas ia sensignifa araneaĵo de folioj. Al malmultaj la bosko estigas la verdan banon de freŝeco, havigante la pacon kaj la sentadon de ripozo kaj trankvileco al la spirito.

Multaj sentas, ke la vento pasas ene de ia tubo el ligno aŭ alia rigida materialo. Aliaj sentas la velurecon kaj harmonian sonon el ia bekfluto.

Ni strebu al la belo. Ni informiĝu pri la mirindaĵo troviĝanta en *ĉio*. Ni emociiĝu antaŭ la Dia kreaĵo. Ni konduku por pli kaj pli fariĝi pli kapablaj identigi la "Dian fingron", kie Li Sin prezentas.

Kaj, post rapida trejnado, ni facile atingos nian ensorĉitecon, identigante la neesprimeblan sensacion de la mirindaĵo.

Sobraj esprimoj por priskribi tioman "grandiozecon".

Tiamaniere, atinginte la komencon, ni atingos tioman spiritostaton, kiu nin kondukos al la mezo de la luktoj de la *ĉiutaga* vivo, al ia plialtiĝo kaj al la atingo de la sekva plataĵo de la evoluado.

Memoru kaj meditu pri la homa kaj dia beleco.

Ilin prikalkulu kaj ilin metu sur la adekvatan skalon de valoraĵoj.

Kaj tiamaniere ni sukcesos senti Dion pli proksima al ni.

Dank'al Dio!



(Spirito: Antônio Francisco

El la portugala tradukis Benedicto Silva

Kunlaboris: João Ângelo)

## NI INTERŜANĜU LIBROJN!

Vi, kiu ŝatas legi, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Viaj libroj estas trege bonvenaj!



Vi bezonas serenecon je ĉiu paŝo.

Sereneco por elekti, agi, vivi.

La vivo estas rapidega, kaj ŝanĝas siajn aspektojn ĉiumomente, postulante konstantan serenecon, por ke ĝi ne ĝenu la homojn.

Kiu afliktiĝas kaj provas sekvi la treegan rapidecon de la nunaj tagoj, tiu krevas, ĉar ŝanĝante rapide de unu al alia situacio, li ne havas tempon por adaptiĝo.

La novaĵoj aperas kaj la okazaĵoj pasas, kaŭzante grandegan malvigliĝon emocian, mensan kaj fizikan.

Gardu vin serene, kaj konservu la aparatojn de via ekzistado, ĉar ili estas programitaj por konvena uzo, sed ne por trouzo.

Libro: "Vivo Feliĉa"  
Spirito: Joanna de Ângelis  
Mediumo: Divaldo Pereira Franco



## NI REKOMENDAS

Libro "Intelligentaj urboj"

Aŭtoroj: David Bianchini kaj Ladislau Afonso

